# Meksika horora filmserio komenci?as en Havano




Havano, jun 27 (RHK) Teruro Mx: Meksika horora filmo-serio komenci?as hodia? en ?i tiu ?efurbo kun la vortoj de profesoro kaj kritikisto Nicolás Ruiz, kiu faris la elekton de la verkoj.

La malfermo estos en la Festivala Domo, kie la specialisto prezentos la mallongan filmon Cerulia (Sofía Carrillo, 2017) kaj la klasikan Alucarda (Juan López Moctezuma, 1978).

Tiu ?i iniciato estas kunordigita de la meksika ambasado en Kubo, kune kun la Meksika Instituto de Kinematografio (Imcine), la Kuba Instituto de Kinoarto kaj Industrio (Icaic) kaj la Domo de la Internacia Festivalo de Nova Latin-Amerika Kino.

En kvar projekcioj estos prezentita egala nombro da mallongaj filmoj kaj plilongaj filmoj de tiu ?i ?enro, kiu atingis kreskantan fifamecon en la lastaj tempoj.

La? la programo, la halo Unu de la Multkinejo Infanta en Havano, la alia ejo de la ciklo, gastigos la projekciojn de Unheimlich (Fabio Colonna, 2021) kaj Veneno por la feinoj (Carlos Enrique Taboada, 1983).

Teruro Mx: Meksika horora filmo-serio fini?os la 4-an de julio. Tiu ?i propono havas la celon elmontri en kubaj teatroj la elekton de verkoj, kun klasikaj kaj nuntempaj titoloj, kiuj traktas rakontojn de la ?enro en la meksika kino.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/358547-meksika-horora-filmserio-komencigas-en-havano

**Radio Habana Cuba**